

Esperanto en Perspektivo, Faktoj kaj Analizoj pri la Internacia Lingvo
de Ivo Lapenna, Ulrich Lins kaj Tazio Carlevaro
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 599, 1975.04.02 & 05

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Sub la titolo ***Esperanto en Perspektivo*** ĵus aperis monumenta libro, kiu estas la rezulto de la inteligenta laboro de CED, tiu Centro de Esploro pri Dokumentado pri la Monda Lingvo_Problemo, kiun fondis kaj poste direktis ĝis pasintjare doktoro Ivo Lapenna.

A.- La subtitolo de tiu 850-paĝa enciklopedieto pri esperanto estas ***Faktoj kaj Analizoj pri la Internacia Lingvo***.

Cl.- Tiu verko estas la frukto de la kunlaboro de multaj personoj, sed la tri ĉefaj estas d-ro Ivo Lapenna, Ulrich Lins kaj Tazio Carlevaro.

A.- Antaŭ ol prezenti la enhavon de tiu gravega kaj ekde nun fundamenta libreto, ni unue rememorigu, kiuj estas tiuj tri ĉefkunlaborantoj :

Cl.- Ivo Lapenna naskiĝis en 1909 en Split, Jugoslavio, doktoriĝis pri juro en la Universitato de Zagreb kaj pri internaciaj rilatoj en tiu de Fort Lauderdale, Usono. Pli frue profesoro pri internacia juro kaj internaciaj rilatoj en la Universitato de Zagreb, li estas nun profesoro pri kompara soveta kaj orienteŭropa juro en tiu de Londono. En Esperanto Ivo Lapenna ludis la ĉisekvajn rolojn : Li estas kunfondinto de Akademia Esperanto-Klubo en Zagreb, kiun li prezidis de 1929 ĝis 1941 ; ekde 1937 kaj ĝis 1950 li prezidis Jugoslavian Esperanto-Ligon ; ekde 1938 li laboris por UEA, unue kiel estrarano, poste kiel ĝenerala sekretario (1955-1964), fine kiel prezidanto (1964-1974). Li fondis CED, por kiu li nelacigeble laboris ĝis 1974. Li estas poligloto, kiu verkis en la kroata, angla, franca, germana, itala kaj esperanta lingvoj. Jen la titoloj de liaj esperantaj libroj : *Retoriko, Aktualaj problemoj de la nuntempa internacia vivo, La Internacia Lingvo, Elektitaj paroladoj kaj prelegoj, Por pli efika informado*, kaj fine pli ol la triono de la ĵus aperinta *Esperanto en Perspektivo*.

A.- Liaj du junaj kunlaborantoj estas Ulrich Lins kaj Tazio Carlevaro. Ulrich Lins naskiĝis en 1943 en Bonn. Li studis historion, politikan sciencon kaj la japanan lingvon en la Universitato de Köln. En 1971-1972 li studis en la Universitato de Tokio. Li lernis esperanton en 1958. De 1964 ĝis 1969 li estis estrarano de TEJO (Tutmonda Esperanto-Junulara Organizo), kaj ĝis la pasinta jaro li estis kunredaktoro de *Kontakto*. Li verkis interalie historion de la persekutoj kontraŭ la esperantistoj : *Esperanto, la danĝera lingvo*, kies reviziita versio aperas en *Esperanto en Perspektivo*. Li nuntempe okupiĝas pri la redaktado de nova *Enciklopedio de Esperanto*.

Cl.- Tazio Carlevaro naskiĝis en 1945 en Bellinzona, Svislando. Li studis medicidon en la Univesitato de Zürich, kie li diplomiĝis en 1972. Li lernis esperanton en 1957. Li estas konata kiel eksterordinara poligloto. Li nun vivas en la kantono de Neuchâtel, kie li estas psikiatro. Li prezidas la Centron de Dokumentado kaj Studo pri la Internacia Lingvo (CDELI) de la urbo La Chaux-de-Fonds. Lia kapablo flue paroli la kvar planlinvojn Esperanto, Ido, Occidental kaj Interlingua multe kontribuis al la rapida riĉiĝo de la interlingvistika arkivejo CDELI.

A.- Oni estus malfacile trovinta pli kapablajn ĉefkunlaborantojn por la verkado de enciklopedieto de esperanto, atendante la aperon de vera enciklopedio.

Cl.- Dank'al mirinde detalaj indeksoj de personoj kaj temoj, tiu libro estas tre utila instrumento, kiun oni povas tre facile konsulti. La ĉapitroj ĉiam formas unu tuton en si mem. Tiel oni povas facile informiĝi pri precizaj punktoj sen devi tralegi la tuton. Kaj la materialo inkluzivas faktojn, kiuj ĝis nun estis konataj nur de tre malgranda rondo de fakuloj. Oni povas antaŭvidi, ke tiu enciklopedieto ĝisradike transformos la sintenon de la esperantistoj rilate al sia lingvo. Ignorado ne plu estos ebla.

A.- Sed ankaŭ la eksteruloj povos esti pli bone informataj pri la fakto esperanto. Jam en Svislando ni povis konstati tion. La ekzisto mem de ***Esperanto en Perspektivo*** faciligis la redaktadon de resolucioj, kiun la Ĝenerala Kunveno de Kultura Centro Esperantista akceptis por defendi sian kulturan agadon.

Cl.- Antaŭ ĉio la esperantistoj povos trovi en ***Esperanto en Perspektivo*** precizajn faktojn koncerne la historion de la lingvo mem, la originalan kaj tradukitan literaturon, la kongresojn, la organizaĵojn, la kampanjojn, ktp. La statistikoj ne mankas kaj ili estas objektivaj. Ili eble malkontentigos la troigemulojn, sed samtempe ili permesos ĝuste taksi la venkojn de esperanto.

A.- Jen tre rapide prezentita la libro ***Esperanto en Perspektivo***, kiu ne povos malesti en la libraro de la kulturitaj esperantistoj.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!